


The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



ON THE RUN TO THE VICTORY CONGRESS

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Majo - Junio • 1957

NI PETAS

KE ONI ATENTU LA ADRESON DE LA REVUO

La adreso citita en la Jarlibro de UEA, 1957, estas malnova adreso de nia *literatura redaktoro*. Lia nuna adreso:

D.B.Richardson, 3412 North Mullen,
Tacoma 7, Washington, Usono.

Oni sendu al tiu adreso literaturaĵojn kaj eldonaĵojn por recenzi.

Ĉion ceteran por la *Revuo* oni sendu al la redaktoro, F.R.Carlson. Adreso:

North American Esperanto Review
2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.,
Usono.

Monpagoj por abonoj, reklamoj, ktp., oni prefere sendu rekte al la kasisto:

Edw. W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd.,
Somerton 16, Pennsylvania, Usono.

Loka Kongresa Komitato (Local Congress Committee) 1957:

Kasisto (Treasurer): John A. Clarke,
25 Van Reipen Ave., Jersey City, N. J.



Rimarku la korekton (Note the correction)

Sekretario (Secretary): George Gabor,
733 West 183rd St., New York 33, N. Y.

ELNA-Sekretario: Conrad Fisher,
RFD 1, Meadville, Pennsylvania.

The North American Esperanto Review

(Nordamerika Esperanto-Revuo)

Vol. 5, No. 3.

May-June, 1957.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.

CONTENTS (English)

New York, City of Pleasure	Page 1
Esperanto in Poland	3
Victory Congress	4
Common Conversational Phrases	5
Esperanto Vagabonds in Europe	6
History	7
Important Notices	10
Local Addresses	14
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto	Inside Back Cover

ENHAVO (Esperanta)

Lulkantoj	Paĝo 8
Bonvolu Skribi (Korespondpetoj)	8, 11
Esperanto en Norda Ameriko	9
Fakaj Informoj	12
Enigmosolvo	13
Lokaj Adresoj	14
Trans la Lingvajn Barilojn	15
Por Rimistoj	16

NOTO: Korespondpetoj, kiuj aperas sub "Bonvolu Skribi", estas senpagaj. Por aliaj anoncoj aŭ reklamoj: ĝis sep linioj de unu kolono, \$1; pli ol sep linioj ĝis 1/4-paĝo, \$5; 1/2-paĝo, \$10; unu paĝo, \$20. El landoj, el kiuj oni ne povas sendi monon, oni sendu la valoron per neuzitaj poŝtmarkoj, aŭ similaj valorajoj, al: Conrad Fisher, Route 1, Meadville, Pennsylvania, Usono.

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 5

May-June, 1957

No. 3

New York, City of Pleasure

(The Fifth Annual Congress of the Esperanto League for North America will be held in New York City, July 4-7, preceded by a "get-acquainted" evening July 3. Lest visitors to New York forget that the city is also famous for other things, Marian Smart has written for the Review a series of three articles, of which this is the second, on "the Big Town".)

PEOPLE COME TO NEW YORK FOR MANY REASONS . . . SOME OF THEM TO SEE THE plays or musical comedies, to hear and see the opera and concerts, or to enjoy the night life of this great city. Should your interest lie in any of these, you are urged to take extra time when you come to New York to the Congress to fulfill your desires.

There are nineteen major plays and seven musical comedies now being performed in New York. There are also about sixteen "off Broadway" plays going on! The phrase "*off-Broadway*", covers the field of shoestring producers, little theatre groups, and some really professional talent scattered about the city, rather than in the true theatrical district on Broadway and the side streets in the Forties. If you plan to attend any of the big hits, it is advisable to write to the Box Office of the theatre *now*, naming alternate dates, for tickets. For information on the shows we again refer you, as in the previous article, to that mine of information, "The New Yorker" magazine.

Big movie houses are also found in the Broadway area, but since most of their offerings are shown sooner or later in the hometown theatres, we suggest that you do not waste precious time seeing them.

However, many visitors like to see Radio City Musical Hall on Sixth Avenue and 49th Street. The theatre itself is impressive and it offers stage performances as well as a good movie. The stage show is spectacular and is sometimes well worth seeing. However, there are many "little" movie houses or "Art" theatres which feature films of special interest, such as avant garde, surrealist, foreign or special subject films, and which are seldom shown outside of New York. Again reference to a current copy of "The New Yorker" is indicated.

Unfortunately for opera lovers, the Metropolitan Opera House is closed in summer and this is true of many of the big concert halls. But many of the Met's great soloists and many of the world's great instrumentalists perform at the Lewisohn Stadium at 138th Street and Amsterdam Avenue. Even ballet is presented, and it is pleasant to sit out under the stars and

(Please turn page)

NEW YORK (*from page 1*)

hear the best of music. Other concerts are given in Central Park. On some nights one can enjoy light classics by the Goldman Band and on other nights serious music. Hours, dates and programs are listed in "The New York Times". Chamber music is performed in Washington Square Park at Eighth Street and Fifth Avenue.

This is part of the Greenwich Village area. Here one can dine in an outdoor garden, stroll to the park for the concert and later sip a cool drink at one of the many sidewalk cafes while the colorful residents of New York's artistic colony saunter by. Concerts are also given in Prospect Park in Brooklyn. With the exception of those given at Lewisohn Stadium all the concerts are free. In the midst of a busy day, a refreshing pause may be enjoyed should one be in the vicinity of the Main Building of the New York Public Library at Forty-Second Street and Fifth Avenue. Directly behind the Library is Bryant Park, small but tree-shaded, with many benches. The Library broadcasts fine music there every day from noon to two o'clock.

There are many night clubs in New York and in the winter they are gay and festive but, as is the case in music, in the summer they move outdoors. The Hotel Ambassador at Park Avenue and Fifty-first Street closes its Embassy Room and opens the Ambassador Gardens, complete with fountain, caged birds cleverly hidden in trees. Part of the gardens are indoors and part outdoors, a pleasant place to dance and dine. There is the St. Regis Roof at the Hotel St. Regis, Fifty-fifth Street and Fifth Avenue, another delightful place. There are many other nice spots such as the Rainbow Room atop the RCA Building at Rockefeller Plaza, the Tavern on the Green at Sixty-seventh Street in

Central Park, on the West side of the Park, which offers dining and dancing on the terrace.

Many pleasant outdoor eating places can be found in New York . . . some with music and a performer or two . . . and some devoted solely to good cuisine. All the above mentioned dining and entertainment spots are a bit on the expensive side, but well worth what they cost in the way of superlative food and surroundings. If you do not care to eat outdoors, nearly every restaurant from the most expensive down to the Nedick stands is air-conditioned. All of the movie places are and so are most of the theatres. So while New York may be hot in the summer and one's coolest clothes are needed, it is advisable to have a jacket or stole handy because sometimes the air conditioning is a bit overdone.

Next month, I shall write of sightseeing, shopping and other amusements.

Marian Smart




Have you registered to attend
the V Congress

?

Come on the 3rd for the mixer

Esperanto in Poland

Extract from the opening speech by Andreo Rajski, President of the Association of Esperantists in Poland, to the XIIIth All-Poland Esperanto Congress, 28-29 October, 1956. This portion (space is not available for the whole of this excellent speech) presents the indomitable spirit underlying the recent revival of the Esperanto movement in many lands.

UR POLISH ESPERANTO CONGRESS occurs in a time of great events and historical occurrences in our country. These facts cannot fail to leave their stamp on our Congress.

We heartily salute the new leadership of the Party with Comrade Gomulka at its head and its titanic labors in the direction of full democratization of our country. We are fully conscious, as Poles and Esperantists, that the Esperanto movement can progress and develop, like any progressive movement, only in conditions of full democracy. All dictatorial regimes have fought Esperanto. Hitler and Franco fought it. Also during the Stalinist regime it was in disfavor. Democracy and development of Esperanto are inseparable. Thus we support those elements in the Party which work for full democratization of our country. We are for full democracy as citizens and as Esperantists.

Seven years separate us from our previous Congress, which occurred in 1949. From that time, there were no Esperanto Congresses, as it was impossible to hold them, despite our efforts. Seven years have also passed since the publication of the last printed booklet "*Nuntempa Pollando*". Since then there was a long period of six years, when we could not publish even one printed book or text. We were refused paper for cyclostyle publications. The press remained silent about us, even paid announcements of Esperanto courses were refused "for lack of space". There was a dark period in Esperanto activity. In fact, the movement stagnated, or more properly was stagnated. Let us state frankly, there was even a proposal from some official

persons, that our Association liquidate itself. In other words, they proposed that the noble work of Zamenhof commit suicide in its own native land.

Naive men! They thought that by decrees and force one could liquidate a noble idea, the work of the genius of our Maestro. Yes, naive men! They paid no attention to the fact that Esperanto has already existed for almost 70 years. During that time the world has changed beyond recognition. During that time great powers have fallen, many social orders have changed, great human catastrophes occurred in the form of two world wars, revolutions have shaken humanity, many world concepts and ideas were born and disappeared — there could stand only an idea which is permanent and great, which is rooted deeply in the needs of humanity. Such a great idea is the work of Zamenhof which, despite all catastrophes, lives and blossoms forth as never before. And these naive ones suggested that we, the disciples of Zamenhof, should with our own hands suffocate this noble idea!

But not such are the Esperantists! Even during the times most unfavorable for us, we existed and labored. There were self-sacrificing supporters of the idea, who kept alive the sacred fire of Esperantism. Let us remember their names: Bugajski and Dratwer, Sakowicz and Zawada, Garbar, Domoslawski, Roman and many, many others.



VICTORY CONGRESS

(Fifth Annual Congress)

the ESPERANTO LEAGUE for
NORTH AMERICA, Inc.

New York City, 1957

July 3, evening "mixer" at Esperanto House, 767 United Nations Plaza.

4th 5th, 6th of July, morning and afternoon business sessions at Hotel Hargrave, corner of 73rd St. and Columbus Avenue.

July 4, morning, formal opening of the Congress; evening, public meeting.

July 6, afternoon, Congress excursion; evening, banquet.

July 7, morning, religious service; afternoon, picnic. Meeting of newly elected officers and Board members.

Congress fee: \$5.00

Local Congress Committee secretary:
George Gabor, 733 West 183rd St., New York 33, N.Y. Treasurer: John A. Clarke, 25 Van Reipen Ave., Jersey City, N. J.

Please note correction in treasurer's address.

For further information, write to the Local Congress Committee secretary.

Send ELNA ballots to same address.

Let's have 500 at the 5th!

HOTEL ARRANGEMENTS

Hotel Hargrave (where Congress meetings will be held): room and bath, \$5, up.

Manhattan Towers Hotel (5 blocks from Congress): room and bath, \$4 and up.

New Endicott Hotel (9 blocks from the Congress): \$3 and up. A block of 40 rooms can be rented at \$100 (\$2.50 per room) per night if ordered in advance, so that the Committee can make the arrangement.

Chairmen of section subcommittees: Science and Medicine, Dr. Robert Rubinstein; Telecommunications, Ray Pease; Vegetarianism, Ray Pease; International Organizations, Dr. I. Boone; Philately, Ralph Bonesper; Design, Alex Wesser; Education, Louis Dormont; Public Information, Dr. Alfonso Lomo.

If your special interests are not among those listed, come to the Congress and start a group. Write now to the Local Congress Committee. They may be able to help you locate others interested in your field.

NOTE on special section chairmen mentioned above:

Dr. Robert Rubinstein, an Esperantist for over thirty years, well-known medical practitioner. Ray Pease, ELNA Board member, member Institute of Radio Engineers. Dr. Boone, prominent in world federalist movement. Dr. Lomo, prominent in export-import industry.

KEEP IN STEP



With NEW IDEAS

Come to the Congress

Common Conversational Phrases

See inside back cover for pronunciation.

Saluton, greeting. *Bonan matenon*, Good morning. *Bonan tagon*, good day. *Bonan vesperon*, Good evening. *Bonan nokton*, Good night. (Note the accusative ending "n". The implied statements are "I give to you a greeting", "I wish to you a good morning", etc.)

Vi estas bonvena, You are welcome. (Do not use in response to thanks. See proper responses below.)

Mi petas or *Bonvolu*, Please. *Dankon* or *Mi dankas vin*, Thanks. *Estis plezuro*, It was a pleasure. *Ne estis dankinde*, It was not worthy of thanks.

Envenu, Come in. *Adiaŭ*, Goodby. *Ĝis la revido*, Until we meet again, So-long. (often shortened in informal use to "Ĝis" or "Ĝis la".)

Sinjorino B., *mi deziras prezenti Gesinjorojn A.*, *Fraŭlinon C.* *Sinjoron D.*, Mrs. B., I want to present Mr. and Mrs. A., Miss C., Mr. D. *Mi ĝojas renkonti vin*, I am glad to meet you. *Kiel vi sanas?* How are you? *Tre bone, dankon*, Very well, thank you. *Ĉu vi parolas Esperante?* Do you speak Esperanto? *Iomete*, A little. *Mi ne komprenas*, I do not understand. *Pardonu, kion vi diris?* Pardon, what did you say? *Vi parolas tro rapide*, You talk too rapidly. (These are particularly useful for beginners.)

NUMBERS: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dek unu, dek du, dudek (20), dudek unu, dudek du, cent (100), ducent,, mil (1000).

Unua (first), dua (second), etc.

MONTHS: januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro, decembro.

DAYS OF WEEK (starting Sunday): dimanĉo, lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato.

In mentioning dates, give day, then

month, then year.

Kiu dato estas? What date is it?

Estas la unua de junio, mil naŭcent kvindek sep, It is the first of June, 1957.

In mentioning time of day, use ordinal numbers for hours, cardinal numbers for minutes.

Kiu (or kioma) horo estas? What time is it?

Estas dek post la sesa, posttagmeze, It is 6:10 p.m. *Antaŭtagmeze*, a.m.

Antaŭ dek minutoj, Ten minutes ago.

Post unu semajno, After a week (use where we would say "in a week". If the sense is actually "in [the course of] a week", say "dum unu semajno").



COME TO THE CONGRESS
AND PRACTISE ESPERANTO
CONVERSATION

IT'S FUN

Come on the 3rd for the mixer
at "Esperanto-Domo", 767 United Nations
Plaza, across from the UN headquarters.

Esperanto Vagabonds in Europe

Third in a series of articles on the wanderings of the Doneis family (Peggy, 14, Pancho, 17, Peter, 8, and their parents, Mary and Armin—Esperantists all).

MUNICH, with its Museum of Science and Industry (completely demolished, but rebuilt again out of the ashes) rated a full day of our time after our earlier all-too-short visit. It was this museum which inspired the building of our similar institution in Chicago. Here the gradual evolving of most of the mechanical skills is portrayed most effectively and ingeniously, and the youngsters had a field day of pushing buttons and observing the results.

In Vienna we rested a while and loitered in the Vienna Woods, rode on the giant Ferris Wheel in Prater Park, loafed along Ringstrasse and Naschmarkt, and visited the International Esperanto Museum in the Hofburg Palace where the archives of the Esperanto movement are preserved.

From Vienna we made short trips to the Czech and Hungarian borders and convinced ourselves that the Iron Curtain is no longer as substantial or impenetrable as in former years. We found the barbwire barriers rolled up and taken elsewhere to serve more useful purposes. The lookout towers at the border were abandoned and grown up with weeds and vines.

South of Vienna we again entered the alpine country in Steiermark and Carinthia and we had not colored film enough to record all the charm, color and form of the neat friendly little mountain villages, every bit as exciting as the Swiss at half the price. Graz, the birthplace of Armin's father, was visited and thoroughly enjoyed and new friends found there, too. Proceeding eastward to Villach in the heart of the mountains close to the Jugoslavian and

Italian border we were made particularly welcome by a very old friend of Armin's with whom he had corresponded for twenty-eight years, since his first visit to Europe. But time was passing rapidly and we began to think of home and school and work; so we headed eastward in our "mountain-worthy" little Volkswagen up over the Grossglockner Pass, and we passed many a larger car with steaming radiator, stopped for cooling and refilling of radiators by the side of the road. We climbed steadily to the very foot of the giant glacier of the same name over an alpine road of marvelous engineering. Through freshly fallen snow we made our way down and on through Tyrol to Innsbruck. Again we enjoyed a rendezvous with old friends.

Then on over the Vorarlberg Pass to the principality of Liechtenstein (a charming country scarcely larger than an oversized postage stamp) and on to friends in Romanshorn and Zurich in Switzerland. Here we left one of our Mexican sombreros with the Liechti family as a memento of our visits in their home. Another we had already presented in Hamburg to Peter's nine-year-old Esperantist friend, Peter Weide. Then we hastened on through Germany on the fast "autobahn" superhighway through Koblenz, Cologne and Dusseldorf to the Dutch border and Rotterdam. Here again we had a "homecoming" among dear friends and kindred spirits. Again the same greetings and farewells had to be said in The Hague, Scheveningen and Amsterdam, as we prepared to fly over to Scotland.

(Next issue, Scotland and—HOME!)



REGARDING THE EARLIEST HISTORY OF Esperanto in America, there are other little-known facts which deserve to be brought out so that credit be given to whom credit is due.

We already know that four Americans were on the first list of Esperantists which was published in September 1889, and one of them was Henry Phillips, who was Secretary of the American Philosophical Society of Philadelphia and the translator of the first Esperanto grammar, printed in this country in 1889.

This Society was at that time actively interested in the international language question.

In the month of November 1887, it published an elaborate twelve-page report entitled "Scientific Value of Volapuk" in which it concluded that Volapuk was very unsatisfactory and could not be recommended; the Society proposed instead the creation of an international committee which "would devise a universal language."

On January 6, 1888, in a supplementary report on Volapuk two new languages were discussed for the first time; one was "Pasilengua" of Steiner, the other was the "International Language" of Zamenhof, and of this last, the report says in part: "The plan of Dr. Zamenhof is especially to be recommended in this respect, and may be offered as an excellent example of sound judgment. It is remarkable, and

remarkably pleasant, to see how easy it is to acquire the vocabulary . . . "

On December 7, 1888, it published another supplementary report on the same subject and there may be other reports which I do not have. All were signed by: D. G. Brinton, M.D., Henry Phillips, Jr. and M. B. Snyder. Mr. Brinton was Chairman in November of 1887.

It should be noted that, of these three subscribers, only Henry Phillips is listed among the first thousand Esperantists, yet it would be very unfair that the names of Dr. D. G. Brinton and M. B. Snyder be not included among the first American Esperantists, simply because they neglected to send their names for the list!

It is to their great credit that they wrote and signed favorable reports on Esperanto, and did their best to organize an International Congress which could solve the language question. Dr. Zamenhof had placed great hopes in their efforts which failed only because of lack of interest abroad, but no Esperantist now living could have done more, or better, than they did!

We who, seventy years later, are still trying to pierce this world-wide wall of indifference toward an International Auxiliary Language should have a warm place in our hearts for these three Esperanto pioneers of the American Philosophical Society. May they be always remembered!

Charles Chomette



**NEW
YORK**

JULY 3-7

make history!

LULKANTOJ

DE VILMA EICHHOLZ

VENU, VENU DOLĈA NOKT'

(laŭ la melodio de Johannes Brahms:
"Guten Abend, Gute Nacht")

Venu, venu dolĉa nokt' !
La rozoj, dianoj
salutas jam vin.
Do ekdormu karulin' !
I: Je morgaŭa maten'
revekigo filin'. :I

PACA KONKURO

(traduko de poemo de Friedrich Hebbel)

Pace konkuras nokto kaj tag'.
Kia dolĉiga kaj silentiga agad'.
Ĉu vi jam dormas, taga dolor' ?
Kaj mia ĝojo, kie ĝi estas, ĥo kor' ?
Perdiĝis ĝojo, ankaŭ dolor' —
Sed de dormemo kaŝe pleniĝis la kor'.

DORMU KORFILO

(laŭ la melodio de la lulkanto de Carl Maria
von Weber: "Schlaf Herzenssöhnchen")

Dormu korfilo, ĥo mia karul'.
Fermu l' okulojn, amata etul'.
Bestoj silentas en stal' kaj ĝarden',
Patro laciĝis dum nokta reven'.

Dormu korfilo en via litet'.
Venu nun dormo al mia filet',
Montru songbildon agrablan al li,
Certe li ĝojos kaj ludos kun ĝi.

Ĉi tiuj tri kantoj kaj kelkaj aliaj troviĝas sur magnetofona rubando (enkantita de Vilma Eichholz) havebla por interesuloj. Skribu al: Vilma Eichholz, General Delivery, Oakville, Ont., Kanado.

BONVOLU SKRIBI

Mi deziras speciale atentigi pri la tri meksikaj fraŭlinoj, novaj esperantistinoj. Ĝis nun grave malhelpis la nordamerikan movadon la manko de taŭga interrilato inter la meksika esperantistaro kaj la gesamideanoj en la pli nordaj landoj. La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko kaj la Esperanto-Meksika Asocio deziras ke la gesamideanoj en la tri landoj bone interkonatiĝu kaj bone kunlaboru. La redaktoro.

Peeter Anso, Tartu, Kastani 24-1, Estonia SSR. Altlerneja instruisto pri matematiko kaj fiziko. Ankaŭ instruas Esperanton en la lernejo. Por la kurso bezonas la jenajn: Originala Verkaro, Leteroj de Zamenhof, Fundamenta Krestomatia, Plena Vortaro, Historio de la Lingvo Esperanto (Privat). Li klopodas starigi tutlandan asocion.

S-ro Olda Valek, Jugoslavskych party 2, 863/86, Praha-Bubeneč, Ĉeĥoslovakio.

F-inoj Susana Fernandez, Leticia Fernandez, Rosa Bella Fernandez, Artículo 123, No. 84, Mexico 1, D. F., Meksikio.

Karlo Kertesz, Királyerdő Str. 126, Budapest XXI. Csepel, Hungarlando. 29-jara, seruristo. Intereso precipe pri usonaj grandaj konstruaĵoj kaj belaj pejzaĝoj, ktp.

Cvetan Stefanov, str. T Evtimi No. 16, Varna, Bulgarujo. 24-jara, komencanto.

Francisko Georgo Mozny, Erben strato 2, Brno, Ĉeĥoslovakio. Pri ĉiuj temoj.

ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

BROOKHAVEN, MISS.— La *Brookhaven Leader-Times*, okaze de la apero de esperantaj lernlibroj kaj vortaro en la publika biblioteko, prezentis longan artikolon pri Esperanto kaj pri S-ino Robert Lee Jones, lernantino de Esperanto, kiu prezentis la librojn. (Noto: Vi povas fari same kiel S-ino Jones. Sendu \$1 kun la nomo kaj adreso de via loka biblioteko al: Esperanto Library, Middleton, Wis. Oni sendos al la biblioteko, kiel kundonacon de vi kaj de Esperanto Library, lernlibron Nelson kaj vortaron Edinburg. Tiam vi povos sendi leteron al la loka ĵurnalo por interesigi la publikon pri uzado de la novaj libroj.

TACOMA, WASH.— *The Tacoma Sunday Ledger-News Tribune* prezentis tutpaĝan artikolon verkitan de S-ano D.B. Richardson, Literatura Redaktoro de la *Revuo*, pri Richard Geoghegan, pioniro de Esperanto kaj unua Prezidanto de la Amerika Esperanto-Asocio.

HOLLYWOOD, CAL.— *The Hollywood Citizen News* prezentis leteron de S-ano Chomette.

LOS ANGELES, CAL.— *The Los Angeles Times* prezentis leteron de S-ano Helmuth, kiu nun vojaĝas en Eŭropo kaj raportas pri la vojaĝo per la *Revuo*.

Esther Radding, artistino de la grupo en Los Angeles, ekspoziciis siajn pentraĵojn en la vestiblo de Teatro Coronet.

Pro la longaj distancoj inter partoj de Los Angeles kaj la rapida kreskado de la movado tiea, necesis starigi studgrupojn en diversaj lokoj en la urbo.

SANTA MONICA, CAL.— D-ro Witt, aktivulo de nia movado, elektigis prezidanto de United Nations Society of Santa Monica. Gratulon al li!

MT. PALOMAR, CAL.— Je la 26a de majo la sudkalifornia esperantistaro piknikis apud la mondfama observatorio, 6138 futojn alte.

La astronomoj rigardas en la longegajn distancojn kaj pripensas aliajn planedojn. La esperantistoj rigardas en la estontecon kaj pripensas kiel fari el la propra planedo pli bonan hejmon por la homaro.

HOUSTON, TEXAS— *The Esperanto Coterie of Texas* donacabonis la *Revuon* por ĉiuj publikaj kaj kolegiaj bibliotekoj en Houston.

PORTLAND, ORE.— El tiu urbo, via redaktoro ricevis katalogon de "The Green Star Trading Co." (La Verdstela Komerca Kompanio), 2912 S. E. 136th Pl. Mi vidis en ĝi tre allogajn bildojn de ĉiaspecaj iloj. Bedaŭrinde, la teksto estas en la angla lingvo, kiun mi ne tre bone scipovas.

SEATTLE, WASH.— Post multjara foresto, revenis al nia urbo malnova samideano, "Jack" Evans, plena de entuziasmo por Esperanto kaj por fari el Seattle la ĉefan centron de esperanta aktiveco en Usono.



Denaska esperantistino, Dianto Rissinger (naskita Chomette) naskis filinon, Linda Carol. Ni esperas al la novveninto longan kaj ĝojan vivon.

Mi vidos vin en Nov-Jorko!

IMPORTANT NOTICES

From the Secretary

Always send payments for the League directly to the treasurer, not to me. His address: Edw. W. Pharo, Jr., 220 County Line Road, Somerton 16, Pennsylvania. Mr. D. E. Parrish is authorized to accept payments along with UEA dues, subscriptions, etc.

I have just received a list of fourteen renewals from the treasurer. I have no way of knowing whether I have sent them their membership cards for this year. If you are on that list and have not received your card, *please* let me know immediately.

I've sent tape recordings to help students learn correct pronunciation (as well as I'm able to help them) to two groups in Canada and a high school club in Wisconsin. A service club in New York state received a fifteen minute talk on Esperanto and our movement, on a tape.

Anyone can borrow these tapes without charge. If you want to give a talk on Esperanto and don't feel able to do it, just borrow one of my tapes and play it, or have one of the group play it for you.

We would like to have every member and reader write on a card the year you first learned about Esperanto, and where and how you found out about it. Just write to me:

I first heard of Esperanto in ———. A friend told me. (I read about it in a periodical.) (Someone sent me a copy of an Esperanto periodical, leaflet, etc.) according to how it came to your attention.

We are interested in finding out the best way to advertise Esperanto. Send all cards to the secretary. Address:

Conrad Fisher, RFD 1,
Meadville, Pennsylvania.

PIONIROJ, ATENTU !

Estas petate, ke vi anoncu al Veterana Esperantista Klubo, 33 Kingscroft Ave., Dunstable, (Beds.) Anglujo, vian naskiĝdaton kaj la daton de via esperantistiĝo. Samideanoj kiuj jam en 1907 estis esperantistoj rajtas porti vere belan specialan insignon (broĉon kun plastika disko unu colon granda, sur kiu estas la verda stelo kun nigra "50" kaj la vorto "Veterano". La sola kosto por enskribi estas la kosto de la insigno mem — 50¢. Se vi preferas, vi povas enskribiĝi pere de D. E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, Cal.

BORROW OR RENT a tape recording to learn correct Esperanto pronunciation.

Temporarily the secretary is offering to make recordings of interest to beginners and advanced students. Recordings are free when a tape is sent to him and a nominal charge is made when no tape is sent.

RECORDINGS AVAILABLE

at 3¾ speed:

3 inch — *Pitfalls of Esperanto*: mistakes commonly made by English speakers learning another language. (Pronunciation only.)

4 inch — *23 nacioj salutas la kongreson: la kultura valoro de la internacia lingvo.*

NOTICE! These are *not* phonograph records. The UEA phonograph records can be ordered from the Chief Delegate of UEA: D. E. Parrish, 328 West 46 St., Los Angeles 37, California.



Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (ĝis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado en *Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 ĝis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interŝ., interŝanĝi.

Armand DeThomas, 5 Rue Anatole France, Fleury-les-Aubrais, Loiret, Francujo. 10 junaj grupanoj dez. kor. per leteroj aŭ bk., prefere kun gejunuloj.

L. Zavadil, Horni ul 390, Zdar n. S., Ĉeĥoslovakio. 26-jara teknika oficisto. Pk.

Ulpiano Villanueva, Colón 337, Miraflores, Lima, Peruo. 35-jara fraŭlo, oficisto. Interesoj: vojaĝoj, lingvoj kaj ĝenerala kulturo.

USSR, Gorkij - 7, poŝtkesto 110, Esperanto, Kapustin L. G. Gestudentoj de la Universitatoj Medicina, Politeknika, Konstruista kaj institutoj; fervojistoj, inĝenieroj, mezlernejaj gelernantoj, diversaj oficistoj kaj laboristoj, kluboj, kulturdomoj kaj urbaj junular-organizoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Indiku viajn interesojn pri korespondado.

Gizella Samira, Warszawa 12, ul. Szustra 13/5, Pollando. Mezaĝa oficistino. Kun kanadan(in)o.

Jirí Stuchly, Ostrava - Vítkovice, Dvorská 3, Ĉeĥoslovakio. 14-jara studento.

Emil Šimša, Obráncu miru 64, Ostrava VII, Ĉeĥoslovakio. 13-jara. Dez. pm. kaj bk. Eda Kovarik, Erbenova 95, Ostrava-Vítkovice, Ĉeĥoslovakio.

Inĝ. Georgi Arnandov, forstisto, v. Rozino, Bulgario. 33-jara, forstinĝeniero. Kun kanadanoj pri esperanto-movado, esperantaj gazetoj, vivmanieroj, moroj kaj kutimoj

Helena Hrudková, Zvolen, Krupinská, cesta 1157, Ĉeĥoslovakio. 29-jara, oficistino. Kun kanadan(in)oj.

S-ino Démazure, 28 Rue Désiles, Saintes, Francujo. 37-jara maŝinskribistino. Kun kanadan(in)o.

Václav Kašpárek, Koprivnice č 171, Ĉeĥoslovakio. Laboristo en aŭtomobilfabriko. Kun kanadanoj.

Liwszyc Maria, Warszawa, ul. Nowolipic 25 m 50, Pollando. Lernantino. Pri sporto kaj muziko. Kun kanadan(in)o.

Sadilek Pavel, Nerudora 14, Ostrava 7, Ĉeĥoslovakio. Kun kanadanoj.

F-ino Laura Orlandi, Via Beccari 4, Bologna, Italujo. Filatelisto.

Eduard Tamm, Hoimu 28-3, Tallinn IX, Soveta Estonio, USSR. Kun usonano pri religio. Dez. la libron "Invito al Ĉielo", rekompenco poŝtmarkoj de USSR, cartempaj rusiaj monbiletoj, aŭ aliaj sendeblaj aĵoj.

F-ino Leopolda Bočkova, Kamenna 9a, Ĉeĥoslovakio. Dez. interŝ. por ricevi usonajn gazetojn *Life*, *Seventeen*, kaj similajn.

Nuntempa Bulgario, Strato Levski 1, Sofia, Bulgario. Ĉi tiu nova belega ilustrita revuo dez. ricevi, kaj publikigos senkoste, adresojn de usonaj kaj kanadaj korespondemuloj. Abono \$1.

Fakaj Informoj

ROTARY-ANOJ

La Rotary-Klubo de Moulins kaj Vichy en Francujo klopodas organizi, per Esperanto, "klub-kontakton" kun malproksimaj eksterlandaj Rotary-Klubo. Ili alvokas ĉiujn Rotary-Klubojn en la tuta mondo por organizo de "Esperanto Rotary Klub-Kontaktoj". Adreso: Marcel Genermont, architecte, Moulins (Allier), France.

KOOPERATIVISTOJ

Esperanto-fako de "Casa de Rochdale", kultura asocio de kooperativistoj, eldonas gazeton *Ĉielarko*. Jarabono, 15 pesoj.

Adreso: Museo Social Argentine,
Av. Corrientes 1723, Buenos Aires,
Argentina

Redaktoro de la antaŭmilita internacia kooperativa gazeto *Ĉielarka Standardo* havas okazon denove ekpropagandi kaj ekuzi Esperanton en ĉiuj kooperativaj centrejoj de sia lando, kondiĉe ke li ricevos interesan materialon senpere de la lokaj koop-organizoj de la tuta mondo. Adreso:

Johano Zawada, Warszawa 21,
ul. Pruszkowska 6. m. 28, Polujo.

FOTO-KINOAMATOROJ

Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kinoamatoroj serĉas korespondamikojn en Usono. Sekretario: Arpad G. Pölösky, Puskas ter 13, Budapeŝto XI, Hungario.

"Grajnoj en Vento" kreas tutmondan reton de infanaj rondoj per Esperanto. Ĉiu rondo estas aro de 12 klasoj aŭ grupoj. Ĉiu rondo eldonas 3-foje jare komunan gazeton el verkoj de la gelernantoj. (Rondoj de infanoj 6-15-jaraj, kaj de 15-20-jaraj gejunuloj). Ne necesas, ke ja infanoj mem scipovu Esperanton. La rondestro traduku se necesos. *Oni nun serĉas novajn grupojn en Usono.* Por pluaj detaloj, skribu al:

Grajnoj en Vento, Rue des Pins 66,
Bienne-Biel 7, Svislando — Suisse.

MALLONGAJ ONDOJ

Radio Roma, 12:55—1:10 pm, EST
Frekvencoj: 5960, 7274, 9709 kc.
Prelegantoj: marde, alterne S-ro L. Minnaja kaj Prof. D-ro V. Musella.
merkrede, S-ro Luigi Minnaja
vendrede, Prof. D-ro Vincenzo Musella

Ŝanĝo en la elsendprogramo de Svisa Kurtonda Servo, Bern:
Lunde, 18.30, Dr. A. Baur
Marde, 12.55, Dr. A. Baur
Ĵaŭde, 12.55, Prof. E. Privat
Vendrede, 18.30, Prof. E. Privat
Frekvencoj: 6165, 9535, 15305, 11865

KOREKTO

En la *Revuo* por majo-junio, 1954, en la artikolo "Nova Vivo por Gertrud", aperis la jeno, kiel diro de Gertrud:

"Tamen, unu granda malfeliĉo; mia angla amikino ne povis ĉeesti."

Temas pri Gertrud Killian, nun Gertrud Heinrich, surdulino, kiu ŝteliris senmone kaj per grandaj penoj el la orienta zono de Germanujo por ĉeesti la kongreson de la Germana Esperanto-Asocio en 1949.

Tamen, "la angla amikino" ja ĉeestis, eĉ alparolis, la kongreson kaj tie renkontis la malfeliĉan Gertrud. La "angla amikino" estas Margaret E. Bowden, administrantokasisto de la Budhana Ligo Esperantista. En letero lastatempa ŝi diris, ke Gertrud dormis kun ŝi en ŝia litĉambro, ili kune manĝis la nutraĵojn portitajn el Anglujo, kaj entute Gertrud spertis dum tiu kongreso tre feliĉan intertempon en mizera periodo de sia vivo.

La Jarlibro de UEA, 1957, listigas 115 delegitojn en Usono. Nia granda lando devus havi multajn pluajn.

La Ĉina Esperanto-Ligo estas restarigita. Adreso: Poŝtkesto 77, Peking, Ĉinujo.

Grava Decido de Amerika Kongreso de Edukistoj

Je la 29a de Januaro, 1957, la Kongreso de Amerikaj Edukistoj aprobis la jenan rezolucion:

La 6a Amerika Kongreso de Edukistoj rekomendas al ĉiuj instruistoj kaj profesoroj la lernadon de la internacia lingvo Esperanto, pro ĝia granda utilo por la internaciaj interrilatoj.

Amerika Kongreso de Edukistoj estas kongreso de organizaĵoj de geinstruistoj en la landoj de Norda, Centra kaj Suda Ameriko.

Ni ŝuldas tiun gravan sukceson al S-ano Manuel Fernández Menéndez, de la Uruĝvaja Esperanto-Societo.

Legu plenan raporton en *Revuo Esperanto*, majo, 1957.

La franca Ministro pri Nacia Edukado ordenis S-anon Raymond Fiquet, administranton de *Nica Literatura Revuo*, per la Akademiaj Palmoj, pro lia merito kiel instruisto pri Esperanto.

S-ano I. Dratwer, sekretario de la Asocio de Esperantistoj en Pollando, ricevis la altan ŝtatan ordenon, Ora Kruco de Merito, pro sia esperantista agado.

La Esperantista societo "Maksim Gorkij" en Sofio, Bulgario, dum malpli ol unu jaro organizis 32 kursojn kun pli ol mil partoprenantoj.

La nombro da organizitaj esperantistoj en Bulgario duobligis dum la lasta duono de 1956.

SOLVO DE LA SILABENIGMO (aprila numero):

La dudek vortoj: 1. lampo 2. abato 3. ardi 4. lasta 5. arbo 6. sinjoro 7. kaldrono 8. armeo 9. sablo 10. tabako 11. alegro 12. fablo 13. eskadro 14. terceto 15. ordinara 16. kapro 17. akto 18. junko 19. komodo 20. alojo.

Uzante la unuan literon de ĉiu vorto laŭvice, kaj tiam la kvaran:

La Alaska Stafeto kaj Kaptitoj de la Glacirokoj.

Tibor Sekelj, en New Delhi por ĉeesti la kunsidon de UNESKO kiel reprezentanto de UEA, starigis Esperanto-kurson tie, kaj tiam pluiris al Ĉinujo por helpi al la reviviĝo de la ĉina Esperanto-movado.

Ni esperu ke tre baldaŭ multmiloj en tiuj antikvaj landoj marŝos sub la verdstela standardo. (Mi intencis diri "verda standardo", sed ĝustatempe memoris — en tiuj mondpartoj "la verda standardo" signifas Islamon, kaj la *Revuo* devas esti neŭtrala pri religiaj aferoj!)

Terminologia Sekcio de ISAE anoncas ke Scienca kaj Teknika Terminaro estas finpresita. Prezo, \$3.60. Mendu ĉe: Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin.

AL LA ĈEFRIMISTO

Per sistema persistemo
Ekspres-isto (eks-presisto)
Farus sin Esperantisto
Ĉe la supro de la listo —
Kion do li farus, ame
Faru same!

Noho

"Ne, karaj amikoj, nek televizio, nek televideo, sed *televido*: tele-vidi, nature formita. Ekster dubeto, tio estas la ĝusta formo."

M. C. Butler

Tre entuziasman recenzon pri "Sinjoro Tadeo" en *Esperanto en Skotlando* finis Marjorie Boulton per la vortoj: "... mi povas rekomendi ĝin speciale al miaj skotaj geamikoj, ĉar vere oni apenaŭ povus aĉeti pli da bona libro por tiel malgranda sumo."

VENU AL LA KONGRESO!

Local Addresses

Esperanto-Klubo de Los Angeles:
1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29,

Washington (D.C.) Esperanto Club:
2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.
Apt. 101

Esperanto-Societo de San Diego:
P.O. Box 4367, San Diego 4, California.

Seattle Esperanto Society:
3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

George E. Wagner, 403 E. North St.,
Tampa 4, Florida.

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue,
Spokane 32, Wash.

Esperanto in Buffalo:
P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

Esperanto Coterie of Texas:
P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

Esperanto Club of Santa Monica:
855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St.,
Milwaukee 16, Wisconsin.

Esperanto Society of Greater New York:
767 United Nations Plaza, New York 1, NY

Esperanto Society of San Francisco:
346 Staples Ave., San Francisco 12, Calif.

Centro por Kanadaj Esperantistoj:
Box 52, Terminal A, Toronto, Kanado.

Christie W. Roberts, Rose Valley,
Saskatchewan, Kanado.

Sacramento Esperanto Club, 450 45th St.,
Sacramento 19, California.

Esperanto Society of Long Beach:
R. C. Betteridge, President,
5409 Graywood Ave., Lakewood, Cal.

LISTIGU VIAN GRUPON!

GRAVAJ NOTOJ

UEA registris 24527 membrojn, 1956.

Grava ilustrita itala revuo presas senpage adresojn de eksterlandaj korespondemuloj, kun mencio de la lingvo uzota. Kiu deziras italan korespondanton, sendu sian adreson al ili, menciante deziron uzi la internacian lingvon Esperanto. Adreso: Leandro, Redazione di "Settimo Giorno" (Ingresso Libero), Via Serio I, Milano.

Progress Subscription Service, Toronto, Ontario, Kanado, peras abonojn por la nova grandformata, plene ilustrita Esperanta eldono de "Pollando". Abono \$3.

Radio Sofia, Bulgario, ofte disaŭdigas informojn pri Esperanto en la nacia lingvo. Ĝi enkondukos esperantajn elsendojn, se esperantistoj el ĉiuj landoj petos tiajn.

Tutŝtata komitato de la rumana esperanta movado formiĝis sub la nomo "Iniciata Komitato por Esperanto de la Rumana Popola Respubliko". Adreso: "Esperanto" Poŝtkesto Nr. 205, Bukureŝti, Rumanio.

Je la 5a de aprilo fondiĝis la Esperanto-Societo de Bombay, la unua esperanta grupo en Hindujo, laŭ iniciato de Tibor Sekelj, reprezentanto de UEA. Oni tuj starigis kurson. Ĉar la lingva problemoj en Hindujo estas elstare grava, la movado tiulanda eble estos unu el la plej rapidkreskaj en la mondo. Sendu salutleterojn, propagandilojn, ktp., por helpi al la grupo. Esperanto-Societo de Bombay, Rev. Anuruddha, Bhikku-in-charge, "Anand Vihara", Nair Hoŝp. Compound, Lamington Road, Bombay 8, Hindujo,

Introduction to
ESPERANTO
THE UNIVERSAL LANGUAGE
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00
Sent on Five Days FREE Examination!
BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

Trans la Lingvaj Barilojn

*Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955.
Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportas al ni.*

FRANKFURTO, GERMANUJO, 9 NOV., 1956

En la centra parto de Frankfurto staras multaj grandaj modernaj konstruaĵoj, kie iam ekzistis malnovaj, historiplenaj. Kiam la dua mondmilito venis, la detruado estis terura; miloj da bomboj falis el la ĉielo kaj detruis la plejparton de la grandaj komercaj konstruaĵoj. Nuntempe oni rekonstruas la urbon, kaj nun ekzistas grandaj modernaj stratoj kun novaj butikoj kaj magazenoj.

Kiam la vagonaro alvenis en la stacidomon, S-ro Franz Rabl atendis nin. Li estas maljuna viro, ekspoŝtisto, kiu havis dum la tago tempon por montri al ni sian urbon. Ni promenis laŭlonge la riveron Maino, kie estas bela parketo kun multaj benkoj por la laculoj. Ni transiris la riveron per malnova kaj interesaspekta ponto al malnova parto de la urbo. Tie ankoraŭ staris la malnovaj domoj, gastejoj kaj malgrandaj komercaj konstruaĵoj, ĉar la bomboj ne tuŝis ĉi tiun parton de la urbo. Ni iris al malnova gastejo por trinki la faman lokan trinkaĵon, pomvinon. Multaj loĝantoj en ĉi tiu parto de la urbo kolektiĝas en ja gastejoj por trinki la malmultekostan kaj bongustan vinon kaj por interparoli pri gravaj kaj malgravaj aferoj.

Post nia trinkado ni vizitis kelkajn novajn grandajn magazenojn kaj la magazenoj rememorigis min pri niaj en Usono, ĉar ili kaj la vendataj aĵoj, kaj ankaŭ la aĉetantoj, aspektis samaj, kiajn oni vidas en nia propra urbo. S-ro Rabl gvidis nin laŭlonge la ĉefstratojn, kaj ankaŭ por vidi kelkajn malnovajn konstruaĵojn, preĝejojn, la urb-

domon, ktp. Tiam ni devis reiri al la stacidomo por renkonti alian samideanon, kiu atendis nin tie je la kvara kaj duono.

Kiam ni alvenis ĉe la stacidomo, altstatura, mezaĝa viro atendis nin ĉe la enirejo. Estis S-ro Puff, peranto por la Sennacieca Asocio Tutmonda en Germanujo, kaj li gvidis nin al restoracio por manĝi, kaj poste ni ĉeestis la monatan kunvenon de lia grupo.

La kunvenejo estis ĉambro en ĉarma gastejo en alia parto de la urbo. Ĉi tiu grupo estas la laborista grupo en Frankfurto. Ankaŭ ekzistas alia grupo, sed ni ne havis okazon por renkonti la geesperantistojn de tiu grupo. Kiam la dek gesamideanoj finis siajn grupajn aferojn, ili faris multajn demandojn al mi kaj Bonnie. Ili estas laboristoj do, kompreneble, demandas pri la vivmaniero, salajro kaj vivkosto en nia lando. Mi lernis ke la afero estas pli bona por ni en Usono, ĉar laboristo en Germanujo gajnas proksimume la saman kvanton da markoj, kiom laboristo en Usono povas gajni en dolaroj, sed oni en Germanujo devas pagi pli por manĝaĵoj, vestaĵoj kaj aliaj aĵoj. Ekzemple, en Usono oni povas aĉeti ĉemizon por kvar dolaroj, kaj en ĉi tiu lando sama ĉemizo kostas dek ses markojn. Ankaŭ oni devas pagi kvar mil markojn por aŭtomobilo en Germanujo kaj oni povas aĉeti saman aŭtomobilon en Usono por mil kvincent dolaroj. Kaj la sama afero ekzistas por preskaŭ ĉiuj aĵoj. La laboristoj ĉi tie en Germanujo devas labori pli da horoj por aĉeti vivnecesaĵojn ol simila laboristo en Usono.

VI ANKAŬ FARU VOJAĜON — AL LA KONGRESO !



OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU !)

Venas la Printempo

Mi deziras nur studeti
Sed printempo intermetas
Sin antaŭ la karan lingvon.

La venteto volas logi;
Ĝi petole min ensorĉas
El difina leciono!

La vojeto ŝajnas diri:
"Mi tutmondon travagadas.
Akompanu, ciganino!"

Mi kapitulaciemas
Ho, printempo! Vin mi amas!
Al aliaj, ĝis revido!

Kaj mi turnas min por iri.
Esperanto nur ridetas:
"Vi revenos kun la vintro!"

Tuj poste konscienco
Mia min instigas diri
Al petola la printempo:

"Ho, ne petu min forlasi
Esperanton! Mi ne vagu!
Tio rompus mian koron."

Ĉar mi ŝatas frue lerni,
La printempon mi rifuzas;
Lecionojn ne forlasas.

Daphne Dodd

LULKANTO

Ĉio silentas en dolĉa ripozo,
Mallevis la kapon la ruĝruĝa rozo,
Songas pri la abelo zuminta –
Songas pri la suno brilinta –.

Abeloj hejmfugis,
La suno foriĝis,
Mallumo ĉirkaŭas nin
Kaŝante ĉion kaj vin.

Steloj ekbrilas je blua tegmento,
Kaj suden forkuris la malvarma vento.
Finis jam kanti la gaja birdar',
Ili nun dormas en granda arbar'.

La birdoj hejmfugis,
La ventoj forkuris,
La nokto dormigas nin
Kaŝante ĉion kaj vin.

Vilma Eichholz

Kiu povas komponi muzikon por ĉi tiu originala esperanta lulkanto? Skribu al:
Vilma Eichholz, General Delivery, Oakville, Ontario, Kanado.

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in hats, *ĉ* as *ch* in church, *g* as in *go*, *ĝ* as *g* in gem, *ĥ* as *ch* in loch, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in azure, *s* as in so, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison *as* for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

worth repeating...



The World
Needs
ESPERANTO
NOW

"I salute Esperanto as a faithful attempt to realize the unification of the peoples."

Georges Duhamel

The great worldwide organization to promote Esperanto
for people of all nations, all religions, all political beliefs
IS



Universala Esperanto-Asocio

The ONLY North American organization affiliated with UEA is
Esperanto League for North America

Every member of the League is a member of UEA

Why not Join Us Now?